



35-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsimirkos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.freehostia.com; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; uea.org; liberafolio.org; eo.eventeo.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Edmond Ludwig pri la Valo de Munster
- Paĝo 4 - Barbara Poterucha, Liba Gabalda pri la 26a IF en Nördlingen
- Paĝo 6 - Favourpreze Flugi al Havano kun Cubana aŭ Copa
- Paĝo 7 - Jean Codjo pri Aventuro en Mondo de Ŝajnegado
- Paĝo 8 - Asta Urbonaite, Marc Vanden Bempt pri Litovoj en Loveno
- Paĝo 11 - Jacob Hasbun pri Arabaj Noveloj
- Paĝo 13 - Poemaro, Alberto Garcia, Raymundo Sousa, Miŝa Bronŝtejn
- Paĝo 14 - Kerstin Rohdin el Svedio pri ŝiaj novaj infanoj kristnaskaj
- Paĝo 16 - Hanojo, Haitio, Valencio, kaj Kie Esperantumi Baldaŭe

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Februaro 2010

- 3 Barbara Poterucha pri nia sano
- 10 Eddy Raats pri vivo en Kubo
- 17 Bernard-Regis Larue pri la plej diversaj lunoj de Saturno
- 24 Sebastjan Kirf prelegas pri Diplomalaborado kaj Bona Espero

Marto 2010

- 3 Barbara Poterucha daŭrige pri nia sano
- 10 Semajna kunveno
- 17 Bernard-Regis Larue pri kial Plutono ne plu estas planedo
- 24 Semajna kunveno
- 31 Semajna kunveno

Aprilo 2010

- 7 Semajna kunveno
- 14 Bernard-Regis Larue sur la vosto de kometoj (sekvu 26 de Majo pri ĉu la ĉielo falos sur niaj kapoj)
- 21 Kostiantyn Demianenko pri Ukrainaj sturgoj kaj aliaj Azovaj fiŝoj
- 28 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

KONCIZA HISTORIO PRI LA VALO DE MUNSTER (Vosgezo-Elzaso-Loreno)

La nomo **MUNSTER** devenas de la latina "monasterium" pro la konstruo de benediktana monaĥejo fare de laŭdire irlandaj aŭ skotaj monaĥoj en la 7-a jarcento. Ili dediĉis ĝin al Sankta Gregorio. Pro tio la valo estas anakŭ nomata la Gregoriovalo (Val Saint Grègoire - Gregoriental).

En 1308 estis konstruitaj ramparoj kaj Munster asociiĝis kun 9 aliaj elzasaj urboj por krei la Ligon de la Dek Urboj (Dècapole - Zehnstädtebund), kiuj dependis rekte de la imperiestro de la Sankta Romia Imperio (Ĝerman-nacia).

En la 16-a jarcento, post la Reformacio, la urbo kaj la valo adoptis la protestantan religion, sed dum la Kontaŭreformacio, dum la Tridekjara Milito, la urbo suferis pro la diversnacia soldataro, kiu prirabis kaj detruis la regionon. Post tiu milito la Traktato de Múnster en Westfalen atribuis Elzason kaj do ankaŭ Munster al la franca reĝlando.

La monaĥejo estis kompreneble fermita en 1791 pro la franca revolucio. En la 19-a jarcento ekdisvolviĝis la teksindustrio en la valo. Ĝi vigligis ties ekonomian vivon.

En 1871 Elzaso denove iĝis parto de la Dua Germana Imperio kaj la landlimo sekvis la krestlinion de la Vosgeza Montaro. Pro la proksimeco de tiu landlimo la multaj vilaĝoj de la valo estis detruitaj dum la Unua Mondmilito.

Poste Elzaso denove iĝis franca ĝis 1940, kiam la nazioj aneksis ĝin tutsimple. Ekde 1943 multaj junaj viroj de la valo estis trudrekrutitaj en la germana armeo kaj pereis. Sed dum la Dua Mondmilito nur la vilaĝo Wihr-au Val estis detruita.

Post 1945 la valo denove iĝis franca. Ankoraŭ plufunkciis la tekso-industrio, sed la artefaritaj teksaĵoj aliloke fabrikitaj iom post iom akcelis la fermadon de la fabrikoj kaj ekde la sesdekaj jaroj la ekonomia vivo de la valo konsistas ĉefe en ekspluatado de la arbaroj kaj en turismo.

La turismo en la valo de Munster

Kompreneble la pejzaĝoj de tiuj mezaltaj montoj ravas la turistoj kaj ebligas migradon sur la miloj da padoj registritaj sur la mapoj por piedmigrado de la **Vosgeza Klubo** (Club Vosgien - Vogesenklub) kreita antaŭ la Unua Mondmilito kaj daŭre aktiva. Centoj da bonvolemuloj prizorgas la padojn kaj instalas la paneletojn por informi la migrantojn pri la sekvota itinero laŭ facile rekoneblaj simboloj. Sekvante tiujn padojn la turistoj povas ripozi en la multnombraj **farm-gastejoj** (ferme-auberge), kie eblas frandi la lokajn produktojn.

Tiuj farm-gastejoj devenas de simplaj dometoj, kie loĝis la "**melkistoj**" (marcaires - Melker), kiuj transmigradis (transhumance - Almauftrieb) printempe la brutojn sur la montarajn herbejojn kaj loĝis tie ĝis aŭtuno, kiam ili devove transmigrigis la gregojn al la farmdomo en la valo. Nuntempe vi povas frandi en tiuj farm-gastejoj la **melkistan menuon** (Repas marcaire) kun la fama **viando-torto de la valo de Munster (Tourte de la valèe de Munster - Fleischtorte des Münstertales)**, la speciale grase en kaldrono pretigitaj terpomoj (**Roigabrageldi**) kaj la de Kirsch-brando kaj kremo surverŝita kazeo <<**Siasskas**>>.

La turismaj instancoj nun ankaŭ proponas diversaj modernaj sportajn aktivaĵojn. Vintre pluraj ski-stacioj ebligas diverstipan skiadon kaj somere eblas krom migradi, montgrimpi, montbicikli, paraŝutflugi, ktp. Ne mankas la diverskategoriaj hoteloj, gast-ĉambroj aŭ fer-loĝejoj por vin akcepti.

Ĉar esperantistoj interesiĝas pri lingvoj...

De tempo al tempo vi aŭdos paroli la elzasan dialekton, unu el la multnombraj germanaj dialektoj. Laŭdire ĝi estas la plej vigla regiona minoritata lingvo en Francio

laŭ la procentaĵo de la loĝantoj ĝin praktikantaj, eĉ se la asimilada politiko jakobena klopodis ĝin elimini jam antaŭ kaj ankoraŭ pli vigle post la dua mondmilito. Ĝi kompreneble ankoraŭ utilas en turisma regiono, kie multas la germanaj turistoj. Daŭre plenplenas la salonoj, kiam la vere multnombraj amatoraj teatraj trupoj ludas en sia loka dialekto. Ankoraŭ ekzistas dulingva eldono de la regiona gazeto DNa (Dernières Nouvelles d'Alsace).

En la lernejoj iom post iom kreiĝas dulingvaj klasoj, kie la infanoj estas instruataj kaj germanlingve, kaj franclingve. En grandaj urboj ekkonkurencas dulingvaj klasoj kun la franca kaj ... la angla!

La fromaĝo de Munster: D'r Menschterkas

La fromaĝo de Munster aŭ Munster-Gèromè kreiĝis dum la Mezepoko en la valo de Munster. En la 7-a jarcento benediktanoj monaĥoj skotaj aŭ irlandaj suprenlaŭiris la riveron La Fecht kaj instaligis unue sur la teritorio de la nuna komunumo Stosswehr, kie ili instalas kapeleton. Poste ili konstruis monaĥejon ĉe la kunfluejo de la granda kaj malgranda Fecht, ĉirkaŭ kiu disvolviĝis la urbo Munster (Monasterium). Unu inter ili inventis recepton por la fabrikado de tiu nun mondfama fromaĝo.

La fromaĝo de Munster aŭ Munster-Gèromè (laŭ la urbo Gèrardmer, kie ĝi estas ankaŭ disvendata) estas preparata per bovina lakto. Ĝi havas molan paston kaj lavatan kruston kaj entenas minimume 45 % da graso.

Cilindra, kun diametro de 13 ĝis 19 cm kaj alta je 2,4 ĝis 8 centimetroj, ĝi pezas minimume 450 g.

Ankaŭ ekzistas malgranda Munster aŭ malgranda Munster-Gèromè minimume 120 g. Tiu fromaĝo estas fabrikata laŭtradicie. La kazeo estas fajne diserigata antaŭ verŝado en muldilojn. Malrapide okazas la elgutiĝo. Post la elgutiĝo kaj salado la fromaĝo restadas en kelo por maturiĝo dum minimume 21 tagoj por la Munster aŭ Munster-Gèromè kaj de minimume 14 tagoj por la malgranda Munster kaj malgranda Munster-Gèromè. Tie ĝi estas lavata kaj turnata ĉiutage.

La Schlitte

La Vozejoj estas kovrataj de arbaroj kaj la homoj, kiuj ekspluatadis tiujn arbarojn bezonis transporti la lignon. Tiucele ili inventis speciale taŭgan vehiklon: la SCHLITTE.

La SCHLITTE estas granda sledo kun longaj glitiloj kiuj suprenkurbiĝas ĉe la antaŭo. Ĝi estas el fago aŭ frakseno kaj, malplena, pezas 28 kg. Kun ŝarĝo la pezo povas atingi tri tunojn!!! La SCHLITTE glitis sur lignaj vojoj disponigitaj kiel fervojaj ŝpaloj. Tiuj ŝpaloj estas fiksitaj per lignaj kojnoj, kiuj elstaras.

La uztekniko de la SCHLITTE estas simpla, sed laciga kaj danĝera. La viroj premis sian dorson kontraŭ la SCHLITTE kaj firmtenis la kurbon de la glitiloj. Tiam ili malsuprenglitis, bremsante la sledon, surpaŝante unu ŝtupon post la alia.

Arbohakistoj kaj SCHLITTE-stiristoj kune suprenmarŝis al siaj laborlokoj. La SCHLITTE-stiristoj surdorse portis siajn SCHLITTE-ojn, la arbohakistoj siajn ilojn: hakiloj, segiloj, kojnoj, ktp...

Ne mirigos vin, ke multis la gravaj akcidentoj, dum kiuj mortis la stiristoj.

Per tiu ligno malsuprenigitaj de la Vosgeza Montaro oni fabrikis ĉarpentojn, meblojn, sed ankaŭ lignokarbon. Tiucele oni stakigis la lignon kaj kovris ĝin per tero kaj musko. Poste oni ekbruligis la stakon, kiu malrapide konsumiĝis. Por scii, kiam la karbo pretas, oni observis la fumon: kiam ĝi blankis, la karbo pretis. Necesis atendi la malvarmiĝon antaŭ ol elpreni la karbon.

Edmond Ludwig, prezidanto de Esperanto France-Est, Francujo

ĈERIZO SUR TORTO

IF-o okazis en urbeto de torta ronda formo ĉirkaŭita per mezepoka, bone konservita murego, 3,5 km longecon.

La kadra temo estis fabeloj kaj legendoj. Ni havis okazon ekkoni iam da fabeloj de diversaj landoj kaj precipe de Latvio kaj vidi imponajn 15 volumojn tre dikajn, kolekton de landaj popolaj fabeloj. Multaj iĝis tutmonde konataj.

Indas memori, ke Andersen aŭ franca Perrault ĉu germanaj fratoj Grimm estas ankoraŭ aktualaj, eĉ por plenkreskuloj.

Historio de Nördlingen iĝis kvazaŭ fabelo. Antaŭ 15 miloj da jaroj, meteorito ĉirkaŭ 1 km de diametro falis sur la teron, kie aktuale situas la urbeto. Ĝia rapideco estis 70 000 km/h kaj eniris al ĉirkaŭ 1000 metroj profunde de grundo, donante internan energion, egalvaloran 250 000 foje de la bombo de Hiroŝimo. Ĝi formis krateron de 12 km de diametro. Naturaj reagoj kaj transformado de biologia kaj geologia procezoj formis en ebenaĵo ĉirkaŭ 25 km de diametro, lagon Ries - la tria laŭ grandeco en Eŭropo.

Post du miloj da jaroj, en glacia periodo la pejzaĝo ŝanĝiĝis. La mistero de tiu teritorio estis malfacile klarigebla de scienca vidpunkto.

En 1961 amerikanaj sciencistoj analizis kaj provis evidente, ke evento estis ekster terplanedo. Ĉiela korpo!!!

Ni revenu al IF-ejo. Domo bone situata, kvieta kaj sekura. Ĉiu-tage oni povis aŭdi krii gardiston (inter 22°- 24°) "So, G Sell so" (ĉio en ordo) de la turo "Daniel" 90 m alteco.

Do trankvile de la knajpo vi povas atingi (sian aŭ ne) ĉamburon, komfortan kun duŝejo kaj WC apartan. Matene dum 2 horoj vi povas matenmanĝi, abunde, varie, bonguste, same dum tagmanĝo kaj vespermanĝo. Mi dikiĝis nur 3 kg!

Mi volas aparte emfazi ĝentilecon de kuiristoj ili eĉ klopodis paroli Esperante! Programo, kiel kutime, altnivelaj prelegoj laŭ gusto kaj intereso.

Tuttaga ekskurso gvidis nin al Nürnberg, kie en decembro 1888 fondiĝis la unua Esperanta Grupo de la mondo!

Ĉi-jare ni havis Dagestanan, Rusan kaj Israelan vesperojn kun tipaj manĝaĵoj kaj drinkaĵoj, trinkaĵoj aŭ drinkaĵoj.

Dum internacia vespero vizitis nin L. Zamenhof kun Klara!

Kun granda ĝojo mi akceptas revenon al Nördlingen por 27-a IF-o kun kadra temo "Lingvoj".

Claude Nourmont kaj Brian Moon el Luksemburgio ofertis al BEG avelojn kun salutoj! Koran dankon!

Barbara Poterucha, Dumviva Membro de EBG

FOTOJ DE LA IF



Leve gedagestananoj du Elenaj kun Ahman. Meze litovinoj Diemante kaj Laima kun dagestananino Elena. Dekstre geruso el Tiĥvin, S. Petroburgo, preparas Silvestron: Mikaelo, Vera, Inga



Litova intermanĝa babilado: Vida, Diemante, Laima kaj Vilija



La redaktoro apud klarigoj pri la mezepoka urbo Nördlingen

LA 26-A IF 27.12.2009-3.1.2010
INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN
Temo: Fabeloj, Fabeloj kaj Legendoj

La ĉi-jaran IF-on ni povas nomi fabelan. Ĝi okazis en belega bavara urbeto **Nördlingen** komplete ĉirkaŭita per mezepoka murego. Ni loĝis en novstila junular-familia gastejo situita tuj malantaŭ la muro. La urbo estis facile atingebla per piede. La kadra ĉeftemo "**Fabeloj, Fabeloj kaj Legendoj**" revenigis nin en junaĝo. Ni aŭskultis historiojn kaj fabelojn de *Andersen*, de la fratoj *Grimm*, rusajn, latvajn, dagestanajn kaj specialan bildfabelon pri ŝipeto *Narklo* kreita de niaj rusaj amikoj *Anna* kaj *Dima*.

La evento komenciĝis per interkona vespero kiun jam de pluraj jaroj animas *Mikaelo Bronŝtejn* el Rusio. Ĉeestis dudek novuloj kiuj rapide integriĝis al la grupo de jam konataj kaj regule partoprenantaj esperantistoj. La plej foraj venis el Japanio, Usono, Israelo, Rusio...

La libroŝervo de FEL (Flandra Esperanto-Ligo) ofertis plurajn librojn, muzikdiskojn kaj aliajn esperantaĵojn. Prizorgis ĝin *Tina* kaj *Paul Peeraets*. La "Knajpa" etoso apartenas al la plej gajaj. Ĉi-foje Harald, Jeon-ok, Vida, Bruno kaj HDP servis bieron, vinon, koktelojn...

Aŭtorajn horojn prezentis *Lena Karpunina* kaj *Mikaelo Bronŝtejn*. Pri la situacio en Afganio parolis *Ulrich Brandenburg*, pri Norda Koreio kaj porka gripo *Harald Schicke*, pri kajakado ĉirkaŭ insuloj *Ugo* kaj *Annarosa* el Italio, artan enpakadon per tukoj prezentis kaj pri ties historio parolis *Masumi* kaj *Tacuo Huĝimoto* el Japanio, memorindan jubilean IF-on en retrospektivo prezentis *Brian Moon*. Krom tio okazis vico da interesaj prelegoj. Estis prezentita baletto, manĉo, pianludado, matena gimnastikado. Oni ofertis kurson de desegnado, paroligan kurson, ktp. Multaj interesiĝis pri vizito al la loka bierfabriko Ankerbräu, kie ĉiu vizitanto ricevis memore bierglasojn kaj kompreneble ili gustumis diversajn bierojn. Ankaŭ urbaj promenoj kolektis multajn interesulojn.

Pluraj profitis oferton de surloka saŭnado. Jam la trian fojon okazis IVU (Internacia Vintra Universitato) kaj la duan fojon Internaciaj ekzamenoj laŭ la nova metodo,

gvidita de *Zsófia Kóródy* kaj *Peter Zilvar*. La ekskurso al *Nürnberg* bone kaj laŭ la plano disvolviĝis. La ĉiĉeronino detale rakontis pri interesaj vidindaĵoj. En la fama restoracio "Bratwurst Röslein" ni bonguste kaj abunde tagmanĝis. Restis sufiĉe da tempo por promenado tra la urbo.

Por dancŝatantoj *Liba* elektis muzikon en ritmo de flamenko kaj ŝi iniciatis lernadon de mazurko, kiu estis prezentita kun granda sukceso antaŭ la *Silvestra* balo. Dum la tradiciaj silvestraj bufedoj kaj baloj ĉiam estas okazo bone manĝi, babilii, amuziĝi, danci kaj bonvenigi la diversajn novjarojn de la ĉeestantaj partoprenantoj. La novjara promeno celis rondiron sur la ĉirkaŭurba murego kiun gvidis *Floreal*. Li akompanis interesulojn al la 90 metrojn alta turo *Daniel* de kie bela vetero ebligis rigardon al la vasta ĉirkaŭaĵo kaj neĝkovrita urbo *Nördlingen*.

Krom la dagestana, rusa kaj la israela vesperoj dum kiuj ni estis regalitaj ne nur per kantoj, dancoj sed ankaŭ per tiulandaj bongustajoj ni ankaŭ festis la Zamenhofan 150-jaran datrevenon per interesa programo kaj ŝaŭmvino ofertita de nia organizanto *HDP (Hans-Dieter Platz)* al kiu ni tutkore dankas pro la brila organizado de IF-oj, kiuj iĝas jaron post jaro pli kaj pli perfektaj.

Kiel antaŭvidite, la festivalo estis ege sukcesa kaj mi invitas vin denove reveni ĉi-jarfine al la sama loko - fabela urbo *Nördlingen* - por festi la 27-an IF en agrabla kaj amika etoso. Dum la tuttaga ekskurso ni vizitos Munkenon.



Liba Gabalda, Francujo

5

6

FAVORPREZE FLUGI AL HAVANO

Pli detalaj informoj troviĝas en la januara numero de la revuo "Esperanto" kaj ĉe :

http://www.uea.org/pdf/flugreklamilo_havano.pdf

Flugoj al la 95-a UK en Havano

Cubana de Aviacion kaj Copa Airlines estas la oficialaj flugkompanioj de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo. Cubana de Aviacion, 80-jara flugkompanio, ofertas al la kongresanoj malaltan tarifon por flugoj el 5 urboj el Eŭropo kaj 13 urboj el Ameriko. Sube estas la netaj prezoj kun interkrampe la aldono por la ceteraj impostoj laŭ la prezoj en decembro 2009 (*la impostoj varias laŭ la lando de la ekflugo kaj la momento de la aĉeto).

Eŭropo:

| | |
|----------|------------------------|
| Londono | GBP 270,00 (+ 172,20*) |
| Parizo | EUR 300,00 (+ 242,42*) |
| Madridro | EUR 390,00 (+ 289,75*) |
| Romo | EUR 620,00 (+ 76,87*) |
| Moskvo | EUR 640,00 (+ 137,26*) |

Ameriko:

| | |
|-----------|------------------------|
| Cancun | USD 160,00 (+ 48,61*) |
| Meksiko | USD 210,00 (+ 126,84*) |
| Panamo | USD 330,00 (+ 144,00*) |
| Karakaso | USD 430,00 (+ 98,94*) |
| Montrealo | CAD 470,00 (+ 130,00*) |
| Toronto | CAD 470,00 (+ 133,25*) |
| Bonaero | USD 580,00 (+ 204,00*) |

Cubana de Aviación flugas ankaŭ el

| | |
|---------------|-------------------------|
| Santo Domingo | USD 225,00 (+ impostoj) |
| San Jose | USD 250,00 (+ impostoj) |
| Guatemala | USD 260,00 (+ impostoj) |
| Bogota | USD 319,00 (+ impostoj) |
| Montego Bay | USD 345,00 (+ impostoj) |
| Kingston | USD 345,00 (+ impostoj) |

Por ricevi la kongresan tarifon, bonvolu kontakti unu el la oficejoj de Cubana menciante ke vi estas kongresano de la 95-a UK en Havano. Listo de oficejoj ĉe :

http://www.cubana.cu/guide/?article=of_otros

La biletoj aĉetitaj ne estas redoneblaj kaj ne eblas flugi per alia kompanio ol Cubana. La vojaĝo povas daŭri maksimume 21 tagojn ekde la unua flugo. La rezervoklaso devas esti H (sed P por

Montrealo, Toronto kaj Moskvo; K por Karakaso; R por Parizo).

Copa Airlines, la alia flugkompanio oficiala, flugas al 45 urboj el 24 amerikaj landoj. Ĝi ofertas rabaton de 15% je la publikaj tarifoj por flugoj el Centra kaj Suda Ameriko kaj Karibeo (rabatkodo C2843) kaj 20% por flugoj el Norda Ameriko (rabatkodo D2843). La kongresa rabato ne estas kombinebla kun alia(j) rabato(j) kaj validas de la 5-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto nur por flugoj de Copa (CM) kaj Aero Republica (CM*) al Havano en la rezervoklasoj S, I, Q, U, V, B, N, K, H kaj Y. Por aĉeti la flugojn de Copa, bv. kontakti unu el ĝiaj oficejoj. Listo ĉe :

<http://www.copaair.com/html/user/default.aspx?pageid=72&lang=es> menciante la rabatkodon kaj ke vi estas partoprenanto de la 95-a UK.

La kompanioj povas peti pruvon de via kongresaneco.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 352, 23-12-2009



Anonco pri U.K. Havano en U.K. Bjalistoko

AVENTURO EN MONDO DE ŜAJNIGADO

Estis dum iu lundo, tute varma tago kiel kutime en landoj ĉirkaŭ la ekvatoro. Estis varme, homoj ŝvitis, kvankam neniu tion rimarkis, ĉar ŝvitado estas ero de la ĉiutaga vivo en lando kie trinki akvon tute freŝan estas signo de luksaĵo. Tiu lundo, kvankam simila al ĉiuj aliaj tagoj de la semajno, estas speciala por Dossi. Post naŭmonata elteno de gravedo venis tempo por aldoni al nia jam popolriĉa planedo alian homon, unu homon plian.



Jean Codjo kun la redaktoro en U.K.Bjalistoko

Ĉu por li jam estis antaŭvidita loko por dormi, manĝaĵo por sin vivteni, lernejo por sin edukadi, respondeco por plenumi? Ĉu brilas la suno, pluvas, kreskas arboj, flugas birdoj, pro plenumata respondeco de homo surtere? Por Dossi, homoj naskiĝas kaj mortas, egale ĉu ili tion deziras aŭ ne. Al Dossi estis tute egale ĉu ŝia filo venu al nia mondo iun lundon aŭ ne: lundo kaj aliaj tagoj de la semajno estas samaj, same kiel la horo aŭ la jaro dum kiu ŝia filo naskiĝis, ĉu la unua aŭ la dua horo, ĉu iu jaro aŭ la alia, statistikaj eroj ne gravas ĉu por ŝi, ĉu por aliaj enloĝantoj de ŝia vilaĝo. Nur gravas, ke unua filo ŝia naskiĝos, la naturo sendepende de la homaro prizorgos lin. Tiel estis la vivritmo en Dossihouse, senzorgoplena vivo, nestrikte planita vivo,

nekontrolebla vivo, vivo de homoj kun nescribaj reguloj. Tiaj homoj, laŭ vidpunktoj de Ne-Dossihouse (ne-enloĝanto de la vilaĝo Dossihouse) estis for de la civilizacio, sekve ili estis primitivaj.

Unua paĝo de "Aventuro en mondo de ŝajnigado" belega libro de Jean Codjo, aĉetebla en FEL

ESPERANTAJ EVENTOJ



Eddy Raats, 13-01, en EBG prelegis pri vojaĝoj en Kubo



Bernard Larue, 21-01, pri Saturno Majstro de la Ringoj



Franz Meul, 27-01, en EBG prelegis pri Kuba Socio

LOVENA FESTO DE INTERNACIA AMIKECO



Marc Vanden Bempt, 06-02, prelegis pri Vortludoj



Bona etoso en trinkejo Lovena, 06-02-2010

LITOVOJ EN LOVENO

Gelitovoj studas en la lovena universitato. Antaŭ du jaroj min trafis la nekutima ebleco partopreni la **Erasmus-/ Sokrates-programon** pri gestudenta interŝanĝado kaj duonjaron vojaĝi por studi en la belga Katolika Universitato Lovena (**K.U.L.** - Leuven), en la katolika teologia fakultato. Kiel studentino pri teologio, mi sciis aparte bone, kien mi vojaĝas. Al neniu estas sekreto, ke la K.U.L. estas ne nur unu el la plej malnovaj universitatoj en la mondo, sed ankaŭ la plej malnova ankoraŭ ekzistanta katolika altlernejo en la mondo. Kelkfoje la Vatikano minacas per fingro ke ĝi forprenos la katolikan nomon de la universitato, ja nemalofte la katolika scienco ĉi tie povas aspekti tro libereca, tamen min ĉi tiu kromgusto de revolucio eble pleje ankaŭ altiris alveni al Loveno por studi magistriĝon.

Ĉi tie la profesoroj, same kiel la studentoj, ne timas novaĵojn, instigas kaj subtenas originalajn prijuĝadojn kaj netradician pensadon. Originaleco ĉiam signifas paŝon kontraŭ "la fluo" kaj la staranta ordo, tamen eco de la K.U.L., laŭ mi sufiĉe belgeca, estas tio, ke tiu paŝo estas paŝata tre subtile, mole, tamen samtempe firme kaj aŭtoritate.


Tia "revolucio" blovas ne nur en la teologia sed same tra la aliaj fakultatoj. Tre rapide tial la K.U.L. povis sin laŭdi per tiaj eŭropaj intelektuloj kiel la humanistoj Desiderius Erasmus kaj Justus Lipsius, la matematikisto Gemma Frisius, la botanikisto Rembert Dodoens, la patro de la moderna anatomio Andreas Vesalius kal pluraj aliaj.

Unu el la plej gravaj trajtoj de la moderna universitato estas plurnacieco. En ĉi tiu jaro en la K.U.L. studas 31.000 studentoj, el kiuj 12% estas alinaciaj alvenintaj el pli ol 120 landoj de la mondo. La nombro de litovaj gestudentoj ekde aliĝo al la Eŭropa

Unio kreskis preskaŭ duoble, tiel nun da ni estas ĉi tie eĉ 22.

Mi tre bone memoras kiel, apenaŭ alvevinta en urbon Loveno, mi tiris la valizon en strato kondukanta de la trajna stacidomo al la centro de la urbo. Tiam mi pensis, ke tio estis plej grava strato de la urbo, sed poste mi eksciis, ke ĉiuj stratoj ĉi tie estas la plej gravaj.

Miajn okulojn altiris statueto "**Fonske**", en kiu bildiĝas junulo, en unu mano tenanta malfermitan libron, en la alia glason, el kiu en sian malfermitan postkranion li fluigas akvon.



Sciante, ke Loveno estas malnova universitata urbo, mi unue pripensis, ke la libro sendube signifas studadon kaj la glaso ekkonsciatajn sciaĵojn.

Kiel poste mi eksciis, tiu ĉi mia interpreto estis la oficiala. La libro efektive signifas streĉan studadon. La studentoj de Loveno ŝanĝis mian rigardon al studado: klereco estas laboro, kiu estas konsciece laborata de la naŭ matene ĝis la oka vespere. Jes, fakte la lokaj studentoj studas la tutan tempon.

Eĉ se tiutage ne estas lecionoj, ili studas hejme aŭ en biblioteko. Al mi,

alkutimiĝinta al la litova studkulturo, laŭ kiu oni ekzamenojn preparas en la antaŭa nokto, tio estis unu granda kultura ŝoko. Sed ni revenu al la "Fonske"-statuo.

Mi ne prokrastis per propra sperto ekscii ankaŭ ĝian neoficialan, ankoraŭ alivorte nomata "veran" signifon. Tiu lasta ekmontras la vizaĝon de la urbo, eble eĉ ankaŭ de Belgio mem. La oficiala diferencas de la "vera" kiam oni parolas pri la glaso tenata de la junulo. Laŭ la "vera" interpretado la fonto de la el ĝi fluantaj scioj konsistas... el plej pura biero!

En Loveno stariĝis ne nur la plej granda belga universitato, sed ankaŭ la plej granda bierfarejo (certe, la plej granda prizono ankaŭ estas ne aliloke ol en Loveno).

Tio estis mia dua kultura ŝoko, kiu nur plifortigis la unuan: la belgaj studentoj konsumas alkoholon kiel frenezaj! Ili respondece studas, sed ankaŭ pli diligente amuziĝas.

Tial la fiksa tagordo de la studento aspektas pli-malpli tiel: 9:00 - 20:00 - studado; 20:00 - 4:00 - amikoj, muziko kaj biero.

Studado en K.U.L.

Studi ĉe la K.U.L. por Litovoj neniel estas facile.

En la litovaj universitatoj multan signifon ricevas la komuna studada disciplino. Tamen, kiel ajn ni volus fieri ĉe la belgoj per nia komuna klereco, tamen decas sebreviĝi per sia supraĵeco de scioj.

En la K.U.L. estas malpli da disciplino, tamen ĝi estas iom pli bone koncentrita kaj necesas multe da tempo kaj penado se oni deziras bonege trapasi la ekzmenojn.

La valorsistemo al litovoj ankaŭ povas aspekti malfacile digestebla.

Ĉi tie la plej granda valoro teorie atingas 20, sed praktike 16 poentojn. Tamen 16 ĉi

tie kongruas kun la litova 10. La restintaj kvar poentoj apartiĝis por valorigi genian aŭ kompletigan laboron.

Kvankam eĉ dezirante ricevi 16 oni devas nemal multe laboregi. En Litovio, se oni finstudis iun materialon kaj respondas al ĉiuj demandoj de la ekzameno korekte, tio valoras 10 poentojn. Se oni brilas per aldonaj scioj, tio valoriĝas per la samaj 10. Do 10 esence ne rakontas al vi, kiom fakte vi scias kaj neinstigas memstare enprofundiĝi en la sciencobranĉon. Estis strange reveninte al Litovio por fini la klerecon.



El la **Erasmus-programo** mi akiris mezumon de 16 poentoj, kio estis tradukita al litova 8 kaj aperis minaco al mia stipendio. Malfacilis klarigi al la litovaj profesoroj, ke 16 estas bonega rezulto. Tamen fine ili agnoskis la diferencon de la studkvalito de VDU (Vytauto Didžiojo Universitetas, en Kaunas, Litovio) kaj K.U.L. kaj plialtigis miajn poentojn.

Unu el la plej bonaj eroj de la K.U.L. estas la fondaĵo de Orient-Eŭropo. Al ĝi orienteŭropanoj dankas atribudadon de tute "sufiĉaj" stipendioj. Fakte, ne por ĉiu fakultato eblas ĝin same facile akiri.

Plej multkosta el tiu vidpunkto estas la teologia fakultato. Ne estas sekreto, ke eĉ pli ol mezume enspezantaj gepatroj en Litovio ne havas forton subteni idojn studentaj en Belgio.

Eĉ la belgoj alijuĝantaj la stipendion kompreneme ruĝiĝas, kvazaŭ per ĝi ĝisvivi ne eblus kaj laboron eviti ne sukcesus. Fakte, la stipendioj ne estas grandaj, tamen litovo lernas elturniĝi ankaŭ kun tre etaj enspezoj. Al kiuj serĉas plian finansan liberecon, la universitato ofertas la eblecon mem perlabori.

Laŭ donitaĵoj de la Internacia fakto de la K.U.L., kvin litovoj studas en la bakalaŭra programo, ankoraŭ kvin en la magistriĝo. Du studentinoj, Agnė kaj Birutė, studas doktoriĝon en la teologia fakultato.

Al ili la K.U.L. estas eble la plej bona loko en la mondo por studi teologion kaj filozofion. Studi ĉi tie estas pli interese ol komplike, precipe post kiam oni alkutimiĝis al la ŝarĝo kaj ritmo.

Aldone, en Okcident-Eŭropo Litovio ankoraŭ estas sekreto. Birutė helpis al la K.U.L. realigi socioreligian fakon en Litovio.

Plimulto de la studentoj en la plena programo antaŭe estis alvenintaj al la K.U.L. laŭ la interŝanĝa programo de Erasmus/ Sokrates kaj revenis por plu daŭrigi la kleriĝon.

La ĉijaron ĉi tie estantaj 10 Erasmus-studentoj el Litovio ankaŭ volus reveni por studi la plenan programon.

La "Erasmus" litovo Laurynas, studenta informadteknologian juron en la internacia jurocentro (ICT), rakontis ke la kvalito de iu fakto ne proporcie kongruas al ĝia studkvalito en Litovio, tamen estas fakoj

por kiuj oni prefere elektu litovajn universitatojn.

Laurynas volus resti ĉi tie por studi, tamen ĉio dependas de la eblecoj. Rolandas en la K.U.L. studas en la instituto pri korpa kulturo kaj kineziterapio, aplikatan fizikan agadon.

Al li impreson lasis ne nur la plurnacieco de la studentoj, sed ankaŭ de la profesoroj, kiel pririĉiganta la ricevitan informaron kaj instrumetodojn. Antaŭ jaro ĉi tie bioingeneron studinta Giedrė estis tre mirigita ne nur de la studkvalito, sed ankaŭ de la mem de la universitato uzataj plej novaj teknologioj. Laŭ ŝi, la dum duonjara bakalaŭro en la K.U.L. akirataj materialoj al ŝi en Litovio sufiĉus por defendi imponan disertacion.



Libertempo en Loveno

Loveno estas studenta urbo. Vendredon preskaŭ ĉiuj aliaj studentoj el urboj de Belgio, ŝtorme dancintaj en la ĵaŭda nokto, ekiras hejmen al siaj naskiĝurboj kaj en Loveno restas ni - komunumo el 60% de la nacioj de la mondo. Granda koncentriĝo da diverseco laŭ nacioj en tre malgranda urbo. Sin kaŝi estas preskaŭ neeble! Tre malfacilas resti en supraĵo.

El antropologia perspektivo baza karakteristiko de la postmoderna mondo estas diverseco. Kiu loĝas en Loveno, estas aŭtomate entirata en la veran epicentron de ties signifo.

Apenaŭ alvenintaj en Loveno, litovoj unue ekserĉas siajn samnacionojn. Tamen post

nelonge ili hejmgigas la urbon kaj eksentas sin pli sekuraj.

Ekde la komenco de la lecionoj, la rondo de amikoj kaj konatuloj kaj la kultura kunteksto plilarĝiĝas.

Tiam unu litovo malpli bezonas la aliajn. Ju pli multnacieca la kompanio, des pli interesa.

Al mi estis strange konstati ke, jen mi estas jam duonjaron en tiu kaldrono de kulturoj, tamen diskutoj pri kulturaj kaj lingvaj diferencoj kaj similecoj neniam tedas. Kiel ajn estu interese, tamen la pli proksimajn rilatojn litovoj plej facilas nodi kun studentoj - eŭropanoj kun parenca kulturo.

Nemalofte ni sentas simpation eĉ al poloj, precipe kiam ni sopiras pri la hejmo, ĉar nome kun ili, ni povas dividi deziron al terpomoj, flanoj aŭ cepelinoj.

La litovoj kiuj longe restas ĉi tie denove pli ofte serĉas kunestadon kun siaj samnacionoj.

Libertempo en Loveno ankaŭ estas tre internacia. Ĉiun tagon okazas almenaŭ unu renkontiĝo, destinita al stimulado de la kultura interŝanĝo de iu lando kaj al toleremo. La baza subtenanto de ili estas plej ofte la K.U.L.

Pli aŭ malpli, ĉiuj nacioj trovas manieron por sin malfermi en la programo - escepte de litovoj. Litovoj nelacigas sin per prezentado de sia lando, tamen, kiel ne estu stranga, ili havas nemalmultan popularecon kaj estimon de la ĉirkaŭaĵo.

Al pluraj el ni eĉ ne venas la ideo organizi ion publikan litovecan aŭ pensi "kial ne?", ni nur levas la ŝultrojn - "sed kion ĉi tie prezenti?"

Eble estas ankaŭ vero. Nia kulturo ne havas klaran guston el okcidenteŭropa perspektivo. Ni ne alkitimiĝis distingi nin kiel kulturo, ja ĝis nun nia lando ne jam estas pluraleca kaj ni ne estas devigataj

11

trocerbumi pri la propra kultura identeco kompare al malsamaj.

Al studentoj en Hispanio aŭ Hindio, mi kredas, estus pli por prezenti kaj rakonti.

Alia respondo al la demando "kial ne?" estas "kaj kiel sin prezenti?" Erasmus-studentoj dum duonjaro ne kredas sin taŭgaj "sin ĵeti antaŭ la leonoj" kaj ne estas sufiĉe da konstantaj studentoj.

Mi kredas ke ankoraŭ ni havas iomete postsovetan neplenalvirecan komplekson kaj havus pli da memfido se ni estu pli multaj.

Do **cepelinojn, blankan salaton kaj litovan likvoron** ni pli ofte dividas en la rondoj de amikoj el la propra kulturo.

Asta Urbonaite
(ellitovigis Marc Vanden Bempt)

ARABAJ NOVELOJ (7a-13a jarcentoj)

Ibnu al-Ĝaŭzijo, Libro de la inteligentuloj

Noveleto 9

Jazido bin Haruno rakontis al mi jenon : Homo tre fidinda, posedanta tre grandan erudicion pri la diroj de la Profeto, enposteniĝis kiel kadio de Vasisto. Vasisto estas antikva iraka urbo, inter Basrato kaj Bagdado, maldekstre de la rivero Diĝlato (Tigriso). Iam alvenis en la urbo iu homo. Li konfidis al unu el la ĵurligitaj atestantoj (asistantoj de la kadio, kiujn li nomumadis) sigelitan sakon, dirante, ke ĝi entenas mil dinarojn. Ĉar la sako longe restadis siadome, kaj la foresto de la homo plilongiĝadis, la atestanto konkludis, ke la homo pereis, kaj sekve intencis elspezi la sumon. Li ruze elpensis metodon por tio fari : li malkudris la sakon ĉe ties malsupro, kaptis la dinarojn kaj ensakigis dirhamojn anstataŭ ili ; fine li refaris la kudron tute same. Dirhamo estas antikva monunuo, ankoraŭ uzata en Maroko kaj en la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj. La abbaso

12

dinaro, ora pieco, valoradis tiutempe 4,25 dinaroj, multe pli ol la dirhamo.

Nu, okazis ke la homo aperis kaj postulis de la atestanto sian deponitaĵon. Ĉi tiu redonis al li la sigelitan sakon. Kiam la homo rehejmeniĝis, li rompis la sigelon kaj trovis en la sako dirhamojn. Li revenis al la atestanto, kaj diris al li : « Allaho protektu vin ! Redonu al mi mian monon ! Ĉar mi konfidis al vi dinarojn kaj anstataŭ ili mi trovis dirhamojn. » La atestanto rifuzis la postulon. Tiam, la homo prezentis la aferon al la kadio supre menciita. La kadio ordonis, ke oni aperigu antaŭ li la atestanton kaj ties oponanton. Kiam ambaŭ prezentiĝis, la saĝulo demandis : « De kiam vi deponis ĉe li tiun sakon ? » Li diris : « Jam de dekkvin jaroj. » La kadio prenis la dirhamojn kaj legis ĝiajn surskribojn. Nu, jen tio, ke la dirhamoj kunportas surskribojn stampitajn antaŭ proksimume du-tri jaroj. La kadio ordonis al la atestanto, ke li redonu al la homo liajn dinarojn, kaj la atestanto konformiĝis al la ordono. Poste li eksoficigis lin kaj diris al li : « Perfidulo ! » Kaj la kadia heroldo distrumpetis : « He ho ! Aŭdu ! La kadio ĵus eksoficigis tia-bintian la atestanton. Neniu lasu sin trompi de li ekde hodiaŭ ! » (N.T. : *mi enŝovas « bin » meze de nia « tia-tia » por iom ŝerce arabigi la tekston. "Bin" (aŭ "ibnu/ibnatu") esta tradicia nomanta araba partikulo, kaj volas diri: « filo/filino de »*) Sekve de tio la atestanto elvendis siajn posedaĵojn en Vasito, kiun li tuj poste fuĝe forlasis. Kaj oni plu neniam aŭdis ajnon pri li, aŭ rimarkis ajnan etan spuron lian.

Noveleto 10

Mi lasis min rakonti, ke iu pilgrimanta komercisto el Horasano (nord-orienta regiono de Irano) alvenis [en Bagdado]. Pretiginte sin pluigi sian pilgrimadon, li disponis ankoraŭ mil restajn dinarojn. Li diris al si : « Se mi kunportus tiun sumon, mi ĝin endanĝerigus ; kaj se mi deponus ĝin ĉe iu, mi timas, ke li rifuzu redoni ĝin al

mi. » Li iris en la dezerton kaj ekvidis arbustan ricinon, sube de kiu li fosis kavaĵon por enterigi tie sian monon, ne vidite de iu ajn. Poste li iris fini sian pilgrimadon kaj revenis. Tuj li malkovris la kavaĵon sed ene trovis nenion. Tiam, li ekploris kaj vangofrapadis mem, kaj ĉiufoje, kiam la homoj informiĝis pri liaj farto kaj situacio li diris : « La tero ŝtelis al mi mian monon ! » Tial, ke lia stato plimalboniĝis, oni diris lin : « Kial vi ne turnus vin al 'Adudo ad-Daŭlato? Li estas sagaca.' Adudo ad-Daŭlato estis la plej eminenta personulo (mortis 983) de la bujida dinastio [persa ŝi'ijisima (ŝijaisma) dinastio, 945-1055, de la ĥalifatoregno de Bagdado, dum la abbaso periodo. Li diris : « Ĉu li hazarde tutkonas la misterojn de la nevidebla mondo? » Oni respondis al li : « Ne estas senutile iri vidi lin. » Li konsentis kaj rakontis al li sian historion. La eminentulo kunvenigis la kuracistojn kaj diris ilin : « Ĉu vi tiun jaron kuracis iun per ricin-radikoj ? » Unu el ili respondis : « Mi tiele flegis tia-bin-tian kaj li estas unu el viaj gravuloj. » Li diris : « Oni tuj alkonduku lin al mi ! » La gravulo alvenis. Li demandis lin : « Ĉu vi flegis vin mem per ricinradikoj ĉi-jare ? » Li respondis : « Jes. » Li diris : « Kiu alportis al vi ilin ? » Li respondis : « Tia-bin-tia, la litajisto. » Li diris : « Oni tuj alkonduku lin al mi ! » Kiam la litajisto alvenis, Ad-Daŭlato diris : « Kie vi kolektis la ricinradikojn ? » Li respondis : « En tia-tia loko. » Li diris lin : « Kunprenu tiun homon kaj iru montri al li la lokon kie vi kolektis la radikojn. » Li foriris kune kun la monproprietulo kaj atinginte la arbuston diris : « Mi kolektis ilin el ĉi arbusto. » Tiam, diris la proprietulo : « Ĉi tie, pro dio, mi lasis mian monon ! » Li revenis al 'Adudo ad-Daŭlato kaj rakontis al li la eventon. Ĉi lasta diris al la litajisto : « Hastu reporti la monon ! » Ĉar li prokrastinadis, Ad-Daŭlato minacis lin per sankcioj. Fine, li reportis la monon.

Jacob Hasbun, membro de EBG, tradukis

SANKTA VALENTINO

Same kiel ĉiu jaro
alvenas tiel preciza;
ekde la mistera griza
nokto de la kalendaro;

tago, Sankta Valentina
festo. Mia akurata
sonĝa, reva, animstata
sento, traflugas, Regina,

kiel de Dio profeto
aŭ de Amoro tirano,
sur l'blovo de uragano,
pere de ĉi poemeto,

la stelo-plena ĉielo,
por kunporti al vi ĝoje,
mian amon, kiu foje
pli, ĝi estas mia celo.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

KVINDEK KVIN

Mi haltu ĉe la dato kvindek kvin
por diro danka:
- Amikoj estas dolĉa nia vin',
kaj dolĉas ankaŭ
vekanta l' sentojn laŭ ĉiama rit'
pokala tinto,
liginta nin fadeno de l' konfid'
en la estinto.

Mi haltu ĉe la dato kvindek kvin
kaj diru pace:
- Aminjo, mi obstine amas vin,
kaj nia pad', se
bonŝancos ni pri sano kaj kompren',
plu daŭros foren,
do la hazardajn gutojn de ĉagren'

13

ne prenu koleron.

Mi haltu ĉe la dato kvindek kvin
kaj diru milde:
- Indulgu ĉiuj, kiuj hatas min, -
ja mi senŝilde
defendis min per mia vortsincer',
kaj nun mi samas.
Jes, mi ne ŝatas vin, sed estas ver',
ke ne malamas.

Mi haltu ĉe la dato kvindek kvin,
mi danku Dion,
pro l' ŝanco, ke ĝis mia vivfin'
mi diros ĉion.
Sed nun, ĉe l' interkrea malkomfort',
kun frunta falto
mi finu.

Kaj min gvidu mia sort'
ĝis vica halto.

Miŝa Bronŝtejn, Tiĥvin, S.Petroburgo, Rusujo

KIO ESTAS MI?

Mi vivas vivon
de amoj, doloroj,
malĝojoj kaj necertoj.
Mi vivas vivon
de ĵaluzoj kaj malkompreno.
Mi vivas vivon
de revoj.
Mi revas vivi vivon
de paco kaj amo
forestante la doloro.
Mia vivo estas iluzio,
estas pasio,
estas fantazio.
La vivon mi fantazias
por vivi en ĝi la vivo
kiun mi volas vivi.

Raymundo Souza, Brazilo

14

NOVAJ INFANOJ KRISTNASKAJ

Novembre 2009 mi havis mirindan
travivaĵon. Mi estis invitita al Ingegård
(mia filino) kaj ŝia familio, kiu januare
estis pligrandigita per tri knabinoj el
Etiopio. Ĝis tiam mi nur vidis ilin
surfote, antaŭ ol ili venis al la nova
familio. Do estis tre interese ekvojaĝi al
la Lando Okcidenta kie ili loĝas apud
Seattle. Mi flugis de Stockholm al
Amsterdam, kie mi ŝanĝu aviadilon por
Seattle. Estis longa nokto antaŭ ol mi
surteriĝis sur Sea-Tac flughaveno, kie
Ingegård kaj la "Etulino" atendis min
post kiam mi sukcese trapasis ĉiujn
kontrolejojn.

Kia revido por Ingegård kaj mi! Kaj
kia mirinda knabineto, Tigist, kiun mi
vidis por la unua fojo. Post kelkaj horoj
la pli aĝaj fratinoj Kidist kaj Malafia
alvenis de la lernejo. Ili studas en unua
kaj dua klaso. Tuj kiam ili eniris la
pordon kaj salutis "mormor" kiun ili ja
neniam vidis, ili volis ke mi helpu ilin
kun la hejmtasko; legado kaj
literumado. Ĉiun tagon kiam mi estis tie
ni faris hejmtaskojn kune. Kia ĝuo
denove sidi apud infaneto kaj helpi ilin
kun legado kaj literumado. Mi
rememoris kiam mi tion faris antaŭ 35-
40 jaroj. Mi tuj komprenis kiom da
malfacilaĵoj, eĉ anglelingvanoj havas
literumi sian lingvon. Oni ja uzas multe
pli da literoj ol necezus. (ekz through!)
La tri novaj nepinoj estas bravaj, ili
alvenis Usonon antaŭ 10 monatoj, tiam
ili ne kapablis paroli angle kaj
kompreneble ne legi kaj skribi.

Nun ni kune studis plurajn horojn,
sed ni ankaŭ ludis kaj ridis kune. Ni
estis en Ludejo, kie ili grimpis,
balancis, svingis kaj sidglitis, tiel ke
mia koro preskaŭ ĉesis bati, precize
kiam la Etulino, 2,5-jara grimpis tre
alten kaj ĵetis sin sur la sidglitejon kun
la vizaĝo plenrida. La mezaĝulino volis
ke mi kaptu ŝin kaj tiklu ŝin ĝis plena
rido. Tio estis la plej granda feliĉo,
kiam mi postkuris ŝin tra la domo.
Kiam mi rampis surplanke aŭ postkuris

ilin tra la ĉambroj mia maljuna skeleto
kelkfoje krakiĝis. Kelkfoje sentiĝis
peze malantaŭe kiam mi ekstaru post la
surplankaj ludoj. Kune kun la pliaĝa
knabino Malafia mi ludis pianon kaj ni
kune faris etajn komponaĵojn. Mi
pensas ke ĉiuj el ili estas muzikemaj,
ĉar ofte mi aŭdis ilin kanteti, kiam ili
okupiĝis pri diversaj aferoj. Ni ludis
FIA kaj ni elpuŝis unu la aliajn de la
ludejo kun «malice ĝojaj ridoj». Imagu
subite ricevi tri novajn nepinojn,
kiujn mi tuj tre ekamis!

Ili vere tre multon lernis dum la
mallonga restado en Usono. Sed ili
estas klerulinoj, ĉar ili elektis la plej
bonajn gepatrojn en la mondo. Ambaŭ
amas ilin kaj instruas al ili ĉion ajn,
kion oni bezonas en La Nova Mondo.
La du pli aĝaj multe okupiĝas per
interfratinaj disputetoj, kaj lernas
defendi siajn rajtojn. La Etulino, kiu
regas la familion per eta, eta «Fera
mano» kaj grandega ridado, tutan
tempon en la nova familio okupiĝis pri
la stranga konduto esti veka kaj ludi
dumnokte aŭ almenaŭ rampi sur sia
patrino dum multaj horoj ĉiunokte. De
tio rezultiĝas ke patrino kaj ankaŭ patro
tro malmulte dormas!

Dum la tri semajnoj kiam mi estis tje
mi rimarkis kiom Etulino evoluis. Ŝi
ĉion komprenas kaj bone komunikas eĉ
senvorte. Dumnovembre ŝi lernis
plurajn novajn vortojn «water»,
«walk», «love», «Piper» (la hundo).
Mom kaj Dad ŝi kompreneble jam
konis, sed nun ŝi aldonis «mormor».

Ingegård dum la jaro multege instruis
ilin kiel diversaj aferoj okazas en la
domo kaj familio. La du pliaĝaj ricevis
instruon ankaŭ legi, skribi kaj kalkuli.
Krom tio ĉio enmiksiĝis vizitoj ĉe
kuracistoj, dentistoj ktp. Mi komprenas
ke estas granda laboro eduki infanojn,
eĉ pli malfacile kun adoptitaj infanoj,
mi pensas. Kun tri aŭ kvar infanoj
ĉirkaŭ si oni devas kapabli fari milojn
da aferoj samtempe. Krom tio oni devas
majstri vizitojn de metiistoj, respondi
telefone pri io kaj alia, respondi al ĉiuj
demandoj, memori ĉion, aĉeti

manĝaĵon, lavi vestojn kaj porcelanon, ŝanĝi vindtukojn ktp. Etulino iom ekis uzi noktovazon, kiam mi estis tie.

Por ke neniu momento en la diurno estu neplenigita de io aŭ alia la gepatroj havis la ideon ke oni translokiĝu, por ke estu pli da loko por la duobligita familio. Prenas multe da TEMPO trovi bonan domon, paki ĉiujn aĵojn, kiujn oni ne disdonis aŭ forĵetis, translokigi ĉiujn restantajn aĵojn + ĉio kion mi priskribis kiel ĉiutagaj okupoj! La tuta translokiĝo prenis nur kvin-ses semajnoj fulmrapide!!! Kiamaniere kapablas tiu familio! Translokiĝo, dujarulo, du knabinoj kiuj komencas la lernejon en "fremda" lando, 19-jarulo kiu ekstudos en la universitato, sed kiu daŭre de tempo al tempo bezonas apogon de la gepatroj!!!!

La domo estas agrabla kun "ludoĉambro, dormoĉambroj kaj manĝejo en la kuirejo kun fenestro en la plafono, tiel ke oni povas ĝui la pluvon, kiu novembre torentas. Tamen kelkfoje la suno ekaperis kaj ni havis ĝuindajn promenojn en la arbaroj. La Etulino promenis certe kilometron eksterdome, tamen la energio sufiĉis por la noktaj ekzercoj en la lito de patrino. Imagu, ŝi apenaŭ povis stari, kiam ŝi antaŭ dek monatoj venis al Usono. La kuracisto diris ke ŝiaj gambaj muskoloj preskaŭ mankis. Ŝiaj nunaj gepatroj vere faris ĉion ajn por helpi al ŝi kaj al ŝiaj fratinoj. En Etiopio ŝi havis ĉiaman infekcion en okuloj kaj oreloj, sed post la alveno en la novan hejmon tio okazis eĉ ne unu fojon. Ankaŭ la subnutrado oni supervenkis per medikamento kaj riĉa nutraĵo.

La antaŭlasta tago la 14-an de novembro, estis mirakla tago por mi. Mi travivis aventuron kun Henrik, mia nepo, belega veturado super deklivoj kaj montoj. Elrigardo super Pacifiko. Guis la aspekton de multaj luksaj vilaoj inter la montoj. Vizitis belan valon inter la altaĵoj de la Kaskadoj. La aventuro finiĝis per lunĉo, suŝi per kio mia nepo regalas min. Kiam ni revenis « hejmen », la « malnova domo » estis

15
vendita. Ingegård kaj mi veturis tien por venigi kelkajn aĵojn al la nova domo. La "malnova" najbaro elvenis kaj ŝarĝis la restantajn meblojn sur ŝarĝaŭton. La mebloj restis por ke la domo pli facile estu vendebla. Ĉio estis pakita sur la eta ŝarĝaŭto kiu aspektis kiel translokiĝa ĉaro en malnovaj tempoj!. Ke tio sukcesis donis al mi eblecon vidi la novan domon plene meblita. Bela domo por la granda familio! Ni tagmanĝis ĉe la malnova tablo de mia gepatra hejmo, je kiu mi ofte sidis dumferie kalkulante por helpi al miaj gepatroj kun laboro en nia librovendejo. La granda evento ke ĉio pri la vendado bone funkciis ni festis per butelo da ĉampano.

La 16-an, Ingegård kaj la Etulino veturigis min al la flughaveno por reiro al Eŭropo/Svedio. Malgaja kaj plorplena adiaŭo. Nun duono de la terглоbo disigos nin dum certe pli ol unu jaro. Kiam ĉiuj vojaĝantoj sidis en la aviadilo laŭparolila voĉo diris « Ladies and gentlemen » eliru la aviadilon, ĝi havas problemon kaj ne ekflugos. Granda problemo por la personaro! Ĉiu homo devis esti denove registrita + la valizoj. Post sephora atendo mi ekflugis al Londono. La valizo atingis mian hejmon nur unu semajnon pli poste, sed bonŝance en bona ordo.

Mi deziras, al vi ĉiuj, bonon por la festotagoj kaj por la nova jaro, la nova jardeko!

Kerstin Rohdin, Svedujo



Kerstin Rohdin kun la redaktoro en Pärnu, Estonio 12-07-2009

UK HANOJO 2012

La elekto de Hanojo kiel la urbo de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en 2012 estis la plej rimarkinda decido de la Estraro de UEA, kiu kunsidis en sia plena konsisto en la Centra Oficejo ekde la 10-a ĝis la 12-a de januaro 2010. Ĝis la lasta momento ankaŭ la korea urbo Busan konkursis, kun alloga oferto, pri la rajto okazigi la Kongreson, sed post longa diskuto la Estraro decidis favore al la vjetnama ĉefurbo. La Esperanto-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.

NGUYEN Phuong Mai, Vic-prezidantino de VEA

HAITIO EN NIA KORO

Antaŭ kelkaj tagoj frapis nin la terura novaĵo pri la katastrofo en Haitio. Terura tertremo praktike detruis la landon, kaj kaŭzis la morton de amaso da civitanoj, kaj centoj da miloj da homoj restas grave vunditaj, kaj perdis siajn hejmojn.

Ankaŭ multaj aliaj homoj, el multaj landoj, kiuj tiam troviĝis en Haitio, perdis sian vivon, inter ili 8 ĉinaj volontuloj, kiuj sindoneme laboris por plibonigi kaj sekurigi la vivkondiĉojn de la haitianoj. Ĉinio havas sperton pri tiaj katastrofoj, kiel ekzemple dum la terura tertremo en Sichuan.

Haitio bezonas nian helpon, la helpon de la tuta mondo. Post la unuaj tagoj, post la laboro serĉi la ankoraŭ vivantajn civitanojn, sub la teruraj ruinoj, venas la dua, grava parto. Kiamaniere efike, ne ĥaose, helpi la landon? Haitio bezonas grandan internacian helpon, dum multaj jaroj.


Eble post ne longe, kiam jam la informoj ne aperos en televido, multaj homoj povas forgesi. Sed la tuta mondo devas konscii pri la bezono kaj devo intense, amike, daŭre helpi, laŭ niaj eblecoj.

Ankaŭ la lokaj esperantistoj bezonas nian helpon. La esperantistaro estas granda familio. Esperantistoj estas sindonemaj kaj certe helpos la haitianojn.

Do, ni ne forgesu pri kio okazis. Ek al la laboro!

La mondo nun konscias pri la neceso solidare labori por la bono de ĉiuj. Kio okazas, terure, nun en Haitio, povas okazi en alia mondoparto. Ni ĉiuj devas esti pretaj rapide kaj solidare oferti niajn fortojn favore al la suferantoj. Ni devus diri: "Ni ĉiuj estas haitianoj".

El Popola Ĉinio 2010-01-27, Redaktoroj: Augusto 分发作业 (Casquero de la Cruz), Li Jianhua kaj Wang Lihua



2010-01-27, Augusto 分发作业 jen en Ĉinio jen en Valencio

Z-FESTO EN VALENCIO, HISPANIO

La 30an de januaro oni festis en Valencio (Hispanio) la 150an Datrevenon de la Naskiĝo de Doktoro Zamenhof. Komence de la aranĝo okazis libera babilado inter la membroj de la Valencia Esperanta Grupo. Poste la prezidanto, s-ro Sempere, diris kelkajn vortojn rilate la feston. S-ro Angelo Garcia bele kaj interese prelegis pri Esperanto kaj Zamenhof, kun riĉa historia enhavo. Tuj poste Augusto Casquero prezentis pere de la komputilo informojn pri Esperanto en Ĉinio, kaj diversajn salutvortojn, en video, de ĉinaj samideanoj. Speciale kortuŝitaj estis ĉiuj post la prezentado de ĉinaj infanoj kantante kaj parolante esperante. Ankaŭ ĉiuj estis ravitaj de la video-saluto sendita por tiu okazintaĵo de la juna ĉina

esperantistino Li Fei. S-ro Luis Salag amplekse parolis pri Esperanto en radio. Por fini, ĉiuj aŭskultis la himnon de Esperanto, en interesa flamenka versio. Kaj kompreneble, kiel kutime, ĉio finiĝis en restoracio, kie ĉiuj gaje bankedis kaj ĝuis la framdaĵojn... Partoprenis la aranĝon 25 samideanoj, el 5 urboj.

2010-01-30, Augusto 分发作业 (Casquero de la Cruz)



Preleganto Angelo Garcia



En la klubejo Valencia



Bankedo post la Zamenhof-festo Valencia

KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

31 marto - 6 aprilo : IJF, 34a Internacia Junulara Festivalo, Roncegno, Trento **Italujo**, meze de la Alpa montaro. Itala Esperantista Junularo, Via Villorresi 38, IT-20143 Milano. <http://iej.esperanto.it/ijf/2010/index.eo.ph>; iej@esperanto.it

2 - 4 aprilo: 3-a Internacia Mezorienta Esperanto-Kunveno en Eskişehir, **Turkujo**. Inf.: Murat Ozdizdar, Dr. Rifat Paşa Sok 17/20 Göztepe Istanbulo, Turkujo. mozdizdar@uaa.k12.tr

17 aprilo: 32-a **Malferma Tago** de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, **Nederlando**. uea@co.uea.org

29 aprilo - 9 majo: 22-a Aroma Jalto, Krimeo Ukrainujo. Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev, **Ukrainujo**. <http://aromajalto.ukrainio.org.ua/>; volodimir@ukr.net

8 - 15 majo: 62-a IFEF (Internacia Fervojista Esperanto Federacio) Kongreso BG-1080 Sofia, str. Ivan Vazov 3, **Bulgarujo**. <http://ifef.free.fr/spip/>; kozsu13@freemail.hu

13 - 16 majo: **Beneluksa Kongreso** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antverpeno, **Belgiujo** <http://www.esperanto.be/kongreso/>

14 - 16 majo: Sveda jarkongreso en Lesjöfors. Sveda Esperanto-Federacio, U Luin (adm.), Myggdalsv. 123, SE-13542 Tyresö, **Svedujo**. <http://www.esperanto.se/>; sefkongr2010@esperanto.se

14 - 17 majo: 91-a Brita Esperanto-Kongreso en Llandudno, Norda Kimrio. Esperanto-Asocio de Britujo, Esperanto House, Station Road, Stoke-on-Trent, ST12 9EJ **Britujo**. <http://www.esperantollandudno2010.org.uk/>; eab@esperanto-gb.org

21 - 24 majo: Komuna franca kaj germana Esperanto kongreso en Kaiserslautern. 87-a Germana Esperanto-Kongreso kune kun la Franca Nacia Kongreso. Herrn Hartmann, Karl-Marx-Str. 37, DE-67655 Kaiserslautern, **Germanujo**. <http://www.esperanto-kl.de/ms/gek2010@esperanto.de>

7-31 majo: REK-26 Peterburgo (Leningrado), Kongreso de **Rusujo**. kongres@reu.ru; Anna Butkevič: annaespero@mail.ru; <http://www.reu.ru/index.php?evento=REK-26>

28 - 30 majo: Boatado en Nacia parko de Aŭkštaitija, Iĝnalina, **Litovujo**. Inf.: Dudenaitė Jolanta, jolanjo@gmail.com aŭ Olga.Strojėva@gmail.com

28 - 30 majo: 100 jaroj de esperanta movado en Bjalistoko. **Pollando**. Esperanto societo, str. Piękna 3, PL 15-269 Bialystok. <http://www.espero.bialystok.pl/>; esperanto.bialystok@interia.pl

1 - 5 junio: Post REK-26 en Moskvo. Svetlana Smetanina, RU-129128 Moskvo, str. Budajskaja 13-35, **Rusujo**. svsmetanina@yandex.ru

4 - 7 junio: 105-a Skota Kongreso de Esperanto en Berwick-upon-Tweed sur la skota-angla landlimo. **Skotlando**. Ed Robertson (SEA 2010 prezidanto), 52 Easter Drylaw View, Edinburgh, EH4 2QP, Skotlando. tel.: +44 (0)131 332 9803. <http://www.skotlando.org/>; ed-robertson@telesvet.co.uk

05 - 19 junio: Esperanto-Karavano per la Trans-Siberia Trajno tra Rusujo - komuna vojaĝado en la ekzotika trajno-linio survoje al la 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio. Organizas: Tatjana Loskutova, RUS-153048 Ivanovo, ul Gen. Hlebnikova 48-71, **Rusujo**, <http://mongolio.info/>; lota49@mail.ru <http://www.ipernity.com/blog/32119/198290>

15 - 23 junio: 32-a Ĉebalta Esperantista Printempo en plaĝo Mielno (apud Koszalin) **Pollando**. Czesław Baranowski, Esperanto, PL-75-017 Koszalin-1 **Pollando**. <http://www.esperanto.koszalin.pl/>; barslavo@wp.pl, tel.: +48 (0) 503-417-825

19 - 23 junio: 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbator, **Mongolujo**. mongolio.info/; LEEJung-kee@saluton.net



26 junio - 4 julio: BET-46 Baltiaj Esperanto-Tagoj en Visaginas, Iĝnalina. Poshtkesto 167, LT-44287 Kaunas, **Litovujo**. litova.ea@mail.lt; <http://www.esperanto.lt/>

27 junio - 3 julio: 63-a Kongreso de IKUE, Parizo, **Franclujo**. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, c/o Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. <http://www.ikue.org/kong2010/index.htm> parizo2010@gmail.com

1 - 7 julio: FRESO - Frusomera Renkontiĝo de Esperantistoj Satantaj Olštino - **Pollando**. Elżbieta Frenszkowska, ul. Orłowicza 35 m 5,

Poska, PL-10-684 Olsztyn. efrenszkowska@wp.pl - <http://www.esperantowolsztynie.pl/>

17 - 23 julio: Internacia Esperanto-Konferenco, IEK en Herzberg, **Germanujo**. Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6/8, DE-37412, Herzberg. <http://osiek.org/osiek/>; esperantozentrum@web.de

17 - 24 julio: 95-a Universala Kongreso, UK en Havano, **Kubo**. <http://www.uea.org/>; uea@co.uea.org

17 - 24 julio kaj **24 - 31 julio** kaj **7-14 aŭgusto**: Someraj kursoj (semajna staĝo) en kastelo Greziljono, Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 Baugé, **Franclujo**. kastelo@gresillon.org; <http://gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo>

13 - 20 aŭgusto: Festo en Tuluzo, Okcitanio, **Franclujo**. Esperanto-muziko: Jomo kaj Vinilkosmo. esperanto-jeunes@jefo.fr aŭ bjokac+eventoj@gmail.com

21 - 28 aŭgusto: 77-a Itala Kongreso de Esperanto en Lignano Sabbiadoro, marborde inter Venecio kaj Triesto, **Italujo**. Brunetto Casini esperanto@edistudio.it; <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>

21 - 28 aŭgusto: 36-a Internacia Semajno de Esperanto en Sete apud Montpellier, **Franclujo**. Trinivelaj kursoj, 50 m de plaĝo, ekskursoj. Esperanto, Kulturo kaj Progreso, 10 passage J.Ferry, FR-34290 Servian, Francio. Tel/fakso: +33(0)4 67 39 16 30. jf.passarella@free.fr; <http://pagesperso-orange.fr/nikolao/esperanto.html>

18 - 27 septembro: 15-a Velura sezono en Jalto, Krimeo, **Ukrainujo**. +3-096-483-8585; Jefim Zajdman - jefim_z@mail.ru; <http://www.jaltaespero.narod.ru/>

24 - 26 septembro: 26-aj ARKONES, ARTaj KONfrontoj en ESperanto, en Poznań, **Pollando**. Tobiasz Kaźmierski - <http://www.arkones.org>

2 - 9 oktobro: 18-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, Katalunio, **Hispanujo**. luis_serrano@mixmail.com; <http://personales.ya.com/semajno/>

11 - 17 oktobro: InPaSem (Internacia Paroliga Semajno). Petr Hrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice apud Prago, **Ĉeĥujo**. +420-257712201, fakso: +420-257712126. chrldle@kava-pech.cz

24 - 30 oktobro: 5-a Kieva Esperanto-semajno en Kiev, **Ukrainujo**. Volodimir Hordijenko, p/k35, UA-01133 Kiev-133, Ukrainio. volodimir@ukr.net; <http://kes.ukrainio.org.ua/>



31/12/2009

Dumviva membro kaj eksa estraranino de Esperantista Brusela Grupo, tie-ĉi en I.F.Nördlingen